PENSEO

N-ro 345

jul. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Al George Floyd


Mi havas la senton,
ke ni ŝipiras nuntempe
je la dudek-kvina horo
de sendirekta mondo.

Krome, *25-a horo*
estas romano intensa
de Virgil Gheorghiu,
kiun mi rekomendas,
kaj hantis mian junecon.

Diaj kreitaĵoj, ni
de Dio heredas
senfinan liberan volon:
liberecon limigitan
de l' justeco de l' Leĝo
de Kaŭzo kaj Efiko.

Juiz de Fora, 02/06/2020.

Papos Nascentes (Brazilo)



hirundeto

hirundeto hirundet'
via tago flugis for
ĉi revene mia verso
dum tagoj ja sen labor'

ŝveb' flug' flug' ŝveb'
via vivo iras plene
sen foriro sen poem'
mi ĉi tie kvarantene

tristas mi ĉi sen babil'
eĉ la ripoz' tedas min
mia verso diris tiel
- kiam sidos vi sur ĝi?

hirundeto hirundet'
vivas vi flugante for
mia verso devojiĝis
ĝia senco fuĝis for

surĉiele ne vin vidis
ho! hirundet' mia vers'
jen perversa jen sen kant'
dume en tempofenestr'
la brilon de Sun' ne vidis
eĉ de alaŭdo plor-kant'!

PRI VIVO

Vivo tute min vin nin konstituas,
Estas ni ruino kaj flukso: Vivo.
Ĉio plu ruas, fluas, ruas, fluas:
Rui, flui iĝas ni mem Vivo.

Jen Vivo mia, via Vivo kruda:
Mem-eko-regulig'-organismika.
Kio pri mi? – espiritualeco nuda –
Krom ĉi Blov' en Ter' kataklismika!?


Vivo: ĉi Blovo Ĝi mem Misteriejo!
Kie mi trovos vin, Vivo vera Io?
Se estos morto, tie en tombejo,
Kie la Vivon amas Vivo en kranio!

DEVIGO

Poezio nova, taŭtologio

tiel preĝas tradici':
novigo estas poezi'
aŭ ne estos Poezio.

Wel CR (Brazilo)



La mar' , kia am' ...
Tiel vaste kviete. Sen alarm' .
Kaj kun tiu sankta diabla dilem':
Estu vi mem ...

Namhaeng Lee (Koreio)




Ni iru kuraĝe al la mondo ekstera

Maljuniĝi estas
surmeti vestojn unu post alia
anstataŭ formeti ilin kun kuraĝo.
Ĝui liberecon
aŭ suferi pro mallibereco
estas laŭ via decido.
Formetu vestojn
por ke via haŭto kaptu flugon de vento!
Staru nudpiede
por ke viaj piedoj kaptu varmecon de tero!
Malfermu bruston
por ke via vizaĝo brilu kun sunradioj!
Ni iru kuraĝe
al la mondo ekstera.

Al mia filo

Mia kara!
Vi vidu per viaj okuloj
la mondon noktsimilan
por trovi lumon brilantan.
Mia kara!
Vi kantu per via lipo
al la mondo dezerta
por kovri per melodio.
Mia kara!
Vi staru per viaj piedoj
sur la mondo tremanta
por stabiligi la teron.
Mia kara!
Vi naskiĝis
por lumigi kaj stabiligi
la mondon.
Mia kara!
Vi naskiĝis
por fari la mondon
ĉiam feliĉa.

Siranuish SLAGMULDER (Francio)



Milda Rekviemo

Morto, tenera kaj simpla libereco,
Daŭrus vojon ĝis via lasta justeco,
Sen rompi ĉi vojaĝon al l'eksteren
En vortbelan kastelon, testamenten.
Kiam la poetino skribus konfesion
En last-poemon, sen iu ajn scion...
La vojaĝ' daŭrigus vojon sen haltiĝi
En tutnovan cirklon por sin ekviviĝi;
Kie la korpo plu ne ekzistus, certe,
Lasus spiriton sen korpe kaj anime!
Kiu memorus ŝin kaj ŝiajn poemojn
Eble nur Amo...kantus Rekviemon...

Printempo en Holandio

Tulipa belkampo ondulegas el vento;
Aromon en aero eklasas printempo.
Brilas jam Suno, alvenis beltempo,
En koro de tulipoj kuradas amsento.
Verŝajne, ni vojaĝas en florokampon,



Kiel en sonĝo, en ne skribita romano,
Sur ĉi benko kisadas junaminda paro;
Supren, jen Sun' ridetas pro ĉi birdaro.


Mulino movigas tenere la braketojn,
Jam videblas hirundetajn dometojn;
La kampo de tulipoj ondulas denove;
Alportante nin la bonparfumon nune!

14/04/2019

Luno kaj Suno

Luno similas al l'oranĝo
Pendigita al l'oranĝarbo
Dum monato ĝi ŝanĝas
Sian rond-belan vizaĝon,
Ŝajne, kiam oni ĝin krakas
Lasante nur la kvaronon
Poste, denove ĝi kreskas,
Kiel ĉiu novnaskulo.
Suno, tage brilas flave
Tiel, kiel ĉiu-ajn frukto
Post sia maturado
Ĝi falas dum la nokto
Pro nebul' ĝi ofendiĝas
Sian ridem-vizaĝon kaŝas
Nur revenas kun alvoko,
Post foriro de nigra nokto!
Geamantoj sin inspiras
L'amosenton sin aldonas
La manojn tenere tuŝas
Sub la Luno, amindumas
Kun reveno de la lumo
Suno ilin fortkisadas
Ridante rigardas okulojn
Tenere karesas lipojn.

Iskouhi Avetiqian (Francio)




L'AMO, ARAH...

Kiam ni trapasus la paralelan vivon
Vivante l'eternecon de deversaj mondoj
Unu vorton de ni transirus ĝis atingi stelojn
Por kaptadi la grandegan horizontan manon.

Ni provus pentri la patrinan naturon ore,
Nin tra la legendaj parfumoj hebriinte,
Lasinte l'ortukon inter verdaj branĉetoj
Danĝeron de l'ogro inter miloj da paŝoj.

Vagabonde al la cîama ventega frenez'
Al nudec' ĉiela, malfermite de kovril' nuba
Atingus ni finfine al la galaksio paradoksa,
Kie pluvetas kviete, ŝanĝiĝas la pejzaĝ'
Kun diaj Sunoj, atinginte lum-astrojn per man'

Lirio Silvestre (Usono)




Marŝante al la Libereco

Krioj kaj ploroj laŭtas en la vento,
Kaj nin plenigas malĝoja sento.
La kontraŭuloj genuiĝas sur niaj koloj.
La ĉielo pleniĝas per malhelaj koloroj.
Ĉu ĉi tio estas kio ni fariĝis?
Ĉi tiu malamo nin korŝiris.
Nun estas tempo por batali,
Kaj por fari la registaron fali.
Per pacaj paŝoj ni marŝos al la libereco,
Por alporti la justecon.



Elena Popova (Bulgario)



MUZIKANTO

Ĉu ludas por li steloj
nokte per violonoj,
aŭ kantas la anĝeloj
en la ĉielo vole?
Ĉu marondoj tamburas,
muzikas laŭvere,
aŭ per flutoj susuras
por li la riveroj?
Kun birdoj kaj vento
ĉu li ŝvebas libere,
kie ĉiu momente
sonas la ĉielsferoj?

La talent' eksentas
kaj pianas sincere.

BLAGOJ DE LA LUNO

La lun' min invitis:
-Vi amon meritas.
Mi sendos rapide
lulilon de radi' .
Ni vin ja renkontos
per amo, sincere.
Nur havu esperon
al mi, ido tera!
Ni al vi rakontos
pri la voj' libera
kaj vastaĵ' senlima
por via animo.
La lunaj promesoj
nokte ja sukcesas…

KIEL AROMAS NIA TERGLOBO

Kiel aromas fojno falĉita,
kiel odoras! …
Tiom da herboj amasigitaj
eligas spiriton.
Aŭdu l' amon prikantas la griloj
por revemuloj
kaj la steloj invitas animojn
al vastoj senlimaj…
Nia terglobo kiel aromas!...
Kiel parolas sendorma!...

Siv Burell (Svedio)



Mi, enmigrinto

Vivi en pruntita lando
sen lingvo kaj laboro – malfacile!
Sed man' en mano
kun amata amiko
eble la lando estos la nia.

Ni konsumas
lingvon, kulturon kaj
novajn pensoprocedojn.
Niaj novaj geamikoj diras:

”Imagu, vi jam akceptis
niajn kutimojn!”

Jes, ni sukcesis – sed
ie troviĝas manko
de mondoj kiuj ne estas,
sed estis,
nia hejmo sur la tero.

Lasu fali la kondukilojn!

Lasu fali la kondukilojn!
La kaleŝo helpas al si
kaj ankaŭ la pasaĝeroj!

Lasu ilin iri!
Lasu ilin iri siajn proprajn vojojn!

Vi nur scias viajn vojojn
ili nur scias la siajn.

Ne agu senbezone!
Restu en vi mem!
Aŭskultu la basan voĉon
en via animo!

Sveta Konjashova (Rusio)




rozoj sovaĝaj
helas somera tago
kaduka domo

kukolaj krioj
antaŭmateniĝa hor'
frua vekiĝo



Jadranka Miric (Serbio)



Vento fajfis en
branĉaro dum susuras
verda foliar'.
***
Post pluvegoj tre
odoras malseka ter'.
Paseroj pepas.
***
Ŝalmosono eĥas
tra pluve lavigita
verda altaĵo.
***
Pluvaj gutetoj
brilas sur aperanta
suno ĝis vesper'.

El Ĉina Antikva Poezio

Su Shi (1037-1101)

Adiaŭado al amiko

—laŭ melodio *Sudlandano*

Mi elakompanis la amikon
al tre fora loko, kie povas
mi, turnante kapon, vidi,
ke nek homoj nek kabanoj trovas
sin en montoj, krom urbeto svaga.
Kiu ja similas al surmonta turo,
alta kaj impona, renkontanta gaston
kaj aŭdiaŭanta lin jen kun plezuro?

Sur revena vojo aŭtunvento blovas
friske, malvamete ĉe vespero.
La disiĝbedaŭron mi nun kovas
kaj maldormas sur la lito frida.
Lamp' oblikve glimas en obskuro,
la malhela morn' leviĝas en mi.
Kvankam aŭtunpluvo jam ĉesiĝis,
miaj larmoj perlas en falkuro.

Rememore pri Chibi

—laŭ melodio *Ĉarma kantistino*

Torentas orienten la river'
kaj ondoj voris la eminentulojn,
ho, de miljaroj, el la ter'.
Laŭdire Generalo Zhou Yu[1]
meritojn gajnis kun fier'
ĉe okcidento de l' antaŭa fortikaĵo
en la batal' de Chibi-sfer'[2],
kie ŝtonĵetoj flugis tra l' aer',
minacaj huloj frapis bordojn,
leviĝis mil amasoj da neĝopelmel'.
Ja pitoreskas montoj, riveroj,
dumtempe kiom da herooj en aper'!

La generalo tiam juna kun sangvin',
edzigita al ĉarmeta belulin',
surportis silk-kapveston
kun pluma ventumil' en mano.
Dum li babilis kun ridoesprim',
malamikoj jam pereis en velŝipoj
laŭ lia strategia plan-reĝim'.
Pro mia rev-sopiro jam longtempa
vizitas mi la batalejon kun inklin'
al rememoro pri pasinto.
Malfeliĉe mi ekhavas grizajn harojn
jam frue je ambici-fin'.
La homa viv' similas al sonĝo.
Mi nun honoru l' lunon
sur la river' per tas' da vin'.

1. *Zhou Yu: generalo dum la periodo de Tri Regnoj.*
2. *Chibi: loknomo. Tie okazis kruela batalo dum la periodo de Tri Regnoj.*

Hirundidoj flugas

—laŭ melodio *Gratulo al novedzo*

Hirundidoj flugas inter luksaj domoj
kie regas muto sen hombru'.
L' ombro de platan'indikas

posttagmezon en tempflu'.
Ĉe vespero frida belulino
jen ĵus post ban-ĝu',
svingas rondan ventumilon
el blank-tulo en vent-sku'.
Ŝia mano ankaŭ blankas
kiel opal-peco, nu.
Kun dormem' ŝi sola
dormas jen en sonĝ' vaku'.
Kiu frapas sur fenestron?
Ŝi vekiĝas el sonĝlando.
Tamen estas vento,
kiu flirtas kun bambu'

Granatfloro, kiel krispa ruĝa nodo,
nun eligas florstamenojn lante.
Kiam falos ĉiuj floroj kaj stamenoj,
ĝi vin akompanos hante.
Mi zorgeme ririgardi l' florojn,
kaj tavoloj da petaloj elegante
ja envolvas la florkoron.
Timas mi, ke vento susurante
blovas, kaj ke restas nur folioj verdaj.
Se vi vidos l' arbon pridemande,
viaj larmoj kun velkintaj floroj
falos plaŭde kaj grandkvante.

Jujubfloroj flirte falas

—laŭ melodio *Silk-lava rojo*

Jujubfloroj flirte falas
sur vestaĵojn ja susure.
En vilaĝo tuta la silk-eltiriloj
disaŭdigas zumojn plezure.
Sub salikoarb' kampul' en kruda vesto
vendas jen kukumojn ofertule.

Sur la longa voj' mi laca
volas ripozeton pro dormemo.
Sub ardanta suno mi soifas
je vintrinko kun avida ĝemo.
Mi frapas je vilaĝkabano:
ĉu mi povus gajni tason da teakvo
por ja liberiĝi el soifa la dilemo?

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Yuan Zhen (779 – 831)

Tri poemoj por mia edzino

1.

De kiam vi, filino plej amata en la hejmo,
Vin edzinigis al mi, ĉio iris malfavore.
Por mi, povrulo, pene vi prifosis vestokeston,
Aĉetis vinon kontraŭ l' ora harpingl' bonkore.
Sovaĝajn herbojn, kiel frandon, vi volonte
prenis;
Dum por hejtaĵo vi ŝuldiĝis al soforoj oldaj.
Hodiaŭ el l' ofico mi enspezon grandan havas,
Per kiu mi oferas al vi kun memoroj fortaj.

2.

Iame ni parolis ŝerce pri aranĝ' postmorta,
Nuntempe antaŭ mi, ve, ĉio ĉi prezentas sin.
Vestaĵoj viaj estas preskaŭ almozodonitaj,
Nur kudrilujo restas, kiu nun konsolas min.
Kun via amo mi kompatas tiun servistinon,
Kaj pro sopira sonĝo monrimedon al ŝi donas.
Mi bone scias, ke bedaŭron tian ĉiu havas,
Sed ke ĝi, al mizera paro, des pli triste sonas.

3.

Sidante sola, mi veploras pri vi kaj eĉ mi
mem:
Eĉ ni kunvivus— ĉu ne efemeras— dum
jarcento?
Senfila Denyou* devis vei pri la Providenco,
Kaj Panyue** pri l' edzino vanis versi en
lamento.
Nun ke ne plenumiĝas la kunest' en sombra
tombo,
Ĉu la alia rekuniĝo ne estus ĥimera?
Mi, nur per ĉi sopiro dum sendorma tuta
nokto,
Repagas al vi, kiu vivis zorga kaj mizera.

**Denyou: Homo el la dinastio Xijin, kiu oferis sian filon por elsavi sian nevon.*

***Panyue: Homo el la dinastio Xijin, kiu verkis tri elegiajn poemojn por funebri pri sia edzino.*
Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-DUA

Inteligento vojaĝas en la nordo

§22-03

Yeque demandis Beiyi pri la Taŭo. Beiyi diris:

"Rektigu vian korpon kaj direktu vian rigardon nur al unu objekto, kaj la natura harmonio venos en vin. Retenu vian inteligentecon kaj koncentru vian menson, kaj la transcenda povo venos kaj loĝi en vi. La virto perfektigos vin kaj la Taŭo vivos kun vi. Tiuokaze via rigardo estos tiel simpla kaj naiva, kiel tiu de novenaskita bovido; vi ne plu turnos viajn okulojn al ĉio, kio okazas en la mondo."

Antaŭ ol Beiyi finis sian parolon, Yeque jam falis en dormon. Tre ĝoja, Beiyi foriris kantante:

"Lia korpo estas kiel stumpo de sekiĝinta arbo,
Lia menso estas kiel cindro estingiĝinta,
Vere konante la Taŭon, li ne plu alkroĉiĝas al la pasinteco.
Senscia kaj senzorga, li ne plu pensas,
kaj tenas sin for de ĉia aktiva diskuto.
Kia homo li estas! Kia homo li estas!"

§22-04

La reĝo Shun demandis sian ĉefministron:

"Ĉu la Taŭo povas esti atingita kaj posedata?"

"Eĉ vian korpon vi ankoraŭ ne posedas. Kiel do vi povus atingi kaj posedi la Taŭon?"

"Se mi ne posedas mian propran korpon, kiu do posedas ĝin?" ree demandis la reĝo Shun.

"Estas la ĉielo kaj la tero, kiuj dotis vin per via korpo," respondis la ĉefministro. "Ankaŭ via vivo ne estas via posedaĵo, ĉar ĝi estas harmonia miksaĵo el la jino kaj la jango, konfidita al vi de la ĉielo kaj la tero. Ankaŭ viaj posteuloj ne estas viaj posedaĵoj, ĉar ili estas nur la metamorfozoj de via korpo. Tial vi ne scias, kien vi vojaĝas, kiel vi vivas, aŭ kia estas la gusto de via nutraĵo. Vojaĝo, vivo kaj gusto estas nur la rezultoj de la funkcioj de la ĉielo kaj la tero. Kiel do vi povus ilin posedi?"

§22-05

Konfuceo demandis Laŭzi:

"Hodiaŭ ni havas liberan tempon, mi volus kapti la okazon demandi vin pri la plej alta Taŭo."

"Unue fastu kaj tenu vin kvieta," diris Laŭzi, "poste purigu vian menson je ĉiaj pensoj, senigu vin je viaj ideoj kaj forlasu vian saĝecon! Kiel obskura kaj profunda estas la Taŭo! Estas malfacile klarigi ĝin per vortoj. Kaj tamen mi penos doni al vi koncizan klarigon pri ĝi.

"La lumo originas el la mallumo, la videblaĵo el la nevideblaĵo, la spirito el la Taŭo, kaj la fizika formo el la energio de la spirito. Ĉiuj estaĵoj naskiĝas kun sia aparta formo unu el la alia. Ĉiuj vivaj estaĵoj kun naŭ aperturoj en la korpo estas vivonaskaj; ĉiuj vivaj estaĵoj kun ok aperturoj en la korpo estas ovonaskaj. La veno de la vivo lasas nenian postesignon; ĝia malapero havas nenian limon. Ĝi povas eniĝi en ĉiun lokon kaj povas resti en ĉiu loko. Ĝi povas atingi ĉien sen limigo. Tiuj, kiuj agas tiele, havas fortajn membrojn, penetremajn pensojn, delikatajn orelojn, kaj akrajn okulojn. Ili uzas sian menson sen laciĝo kaj estas malkaŝema en sia konduto.

"La ĉielo ne estus tiel alta, nek la tero estus tiel vasta, se ili ne sekvus la Taŭon. La suno kaj la luno ne moviĝus, se ili ne sekvus la Taŭon. La estaĵoj en la mondo ne prosperus, se ili ne sekvus la Taŭon. Jen la funkcioj de la Taŭo.

"Plie, la erudiciulo ne nepre konas ĝin, nek la elokventulo povas doni klarigon pri ĝi. Tial la saĝuloj neniam agas kiel ili. Ne pliigi, kion oni jam pliigis, nek malpliigi, kion oni jam malpliigis, jen la principo sekvata de la saĝuloj. Profunda kiel la maro kaj alta kiel la monto, la Taŭo rekomenciĝas ĝuste tiam, kiam ĝi finiĝas, en senfina ciklo. Ĝi ampleksas kaj nutras

ĉion en la mondo kaj neniam elĉerpiĝas. Mi timas, ke la vulgaraj kleruloj havas nur supraĵan komprenon pri la Taŭo kaj tamen brue rezonas pri la Taŭo. Ĉiuj estaĵoj en la mondo trovas nutraĵon en la Taŭo, kiu estas neelĉerpebla. Jen kia estas la Taŭo.

"Vivas iu homo en la centra parto de la lando. Sentante sin sendependa kiel de la jino, tiel ankaŭ de la jango, li loĝas inter la ĉielo kaj la tero. Alprenante portempe la homan formon li finfine revenos al sia origino. Konsiderate laŭ la genezo, lia naskiĝo estas nur la kolektiĝo de la vitala energio, kaj lia vivo povas esti longa aŭ mallonga. Kia do estas la diferenco inter la vivo longa kaj la mallonga? Ĝi estas ne pli ol momento, ne sufiĉa por distingi inter la boneco de la reĝo Yao kaj la malboneco de la reĝo Jie.

"La fruktoj kaj melonoj estas diferencaj inter si, sed ili sekvas la saman modelon de la kreskado. La homaj interrilatoj estas diferencaj inter si, sed ili povas esti aranĝitaj laŭ la ordo de aĝo. La saĝuloj ne malobservas la homajn interrilatojn, sed ili ne alkroĉiĝas al la pasinteco. Ili sin akomodas al la situacio, — jen la virto; ili sin adaptas al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj, — jen la Taŭo. En tiu ĉi maniero la suverena povo prosperiĝas kaj suvereno atingis sian povon.

"La vivo de la homo inter la ĉielo kaj la tero estas tiel mallonga, kiel la ekgalopo de blanka ĉevalido rapidkura tra murfendo, kaj subite ĝi malaperas. Plenaj de vigleco ĉiuj estaĵoj venas en la mondon; iom post iom kadenciĝante ili revenas al la origino. En tiu ĉi procezo de ŝanĝiĝo io naskiĝas kaj io mortas. La vivaj estaĵoj afliktiĝas pri la morto, kaj la homoj funebras pri ĝi. Tamen la morto estas ne pli ol liberiĝo el la kateno altrudita de la naturo. En momento la animo senbrue malaperas, kaj tuj la korpo sekvas ĝin. Tio ja estas granda reveno! La senforma alprenas formon kaj la formo revenas al la senformeco. Tio estas fakto konata al ĉiuj homoj, ne la vero serĉata de tiuj, kiuj jam atingis la Taŭon. Tio estas ankaŭ diskutotemo inter la vulgaruloj. Tiuj, kiuj atingis la Taŭon, ne parolas pri ĝi; tiuj, kiuj parolas pri ĝi, ne atingos la Taŭon. La diskuto, kontraŭe, malhelpas al homoj atingi la Taŭon, kaj tial estas pli bone resti silenta, ol diskuti kaj argumenti pri ĝi. La Taŭo ne povas esti aŭdata pere de vortoj, kaj tial estas pli bone ŝtopi la orelojn, ol voli ĝin aŭdi. Tio estas nomata 'la granda atingo de la Taŭo'."

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Pluva Somero

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Junio
pluvas ŝtormete.
Tage aŭ nokte pluvo
enuigas iomete,
diris mi ridete!

Odoras
strata tiliar`
miksita kun sufoka
aero.Flugas birdar`
sub griza nubar`.

Alogas
nin sunsubiro .
Dum sunaj posttagmezoj
oras ĉiel`. Jen, miro ,
freŝas sopiro.

Malgajas
ni pro natura
fi harmonio,
pro la veter` obskura.
kaj neĝo pura!

Somero
jam venis lante.
Pluvoj faris inundojn.

Ni ĝojas esperante
plu vivi kante!

Ekis somero

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Ĉielo
ruĝis laŭvorte
dum suno malaperis
okcidente laŭsorte .
kvazŭ morte!

Vetera
ŝanĝo.Eĉ birdar`
silentas en branĉaro.
malĝojas blanka turtar`
kaj kolomba par`.

Ventego
ŝtorme alvenis.
Falis verda foliaro`
ploranta adiaŭis.
Dancante mortis.

Fajfis
tondre ventaĉo,
hajlis, jen kugloforme,
sur cikoni` nestaĉo
dum someraĉo.

Sopiras
ni someron pli
varman sen kovid virus`.!
Ferioj sukcesaj pli
ol esperus ni!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Yanke (Ĉinio)

Herba en monto

—laŭ   inesko Dekses-Silabo*

Post
foriro de vintra-frost'
alvenas
la printempa tost'.

El
la fendo de monta ter'
aperas
ia verda bel'.

Ja,
herbŝos' elŝovas sin tra
la grundo
per penego, ha!

Vent'
blovegas el okcident'
por ĝeni
ĝin jen per turment'.

Jen
pluvo ĝin batas per pen'
por puŝi
ĝin ĝis morta sven'.

Sed
ĝi firme staras sen ced',
ankoraŭ
Kreskas en kviet'.

Sun'
donas varmon per brakum',
ĝin helpas
ankaŭ la lunlum'.

Ĝi
ja strebas kun energi'
al alto
per brava defi'.

Kun
svelta kaj longa tig' nun,
fiere
ĝi staras en jun'.

** Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Fratoj Grimm

Dormulino

Antaŭ longa tempo vivis reĝo kaj reĝino, kiuj diris ĉiutage: „Aĥ, se ni nur havus infanon!“
Sed ili ricevis infanon neniam. Jen okazis, kiam la reĝino iam sidis en la banejo, ke rano rampis el la akvo sur la herbejon kaj diris: „Via deziro plenumiĝos, antaŭ ol pasos jaro vi naskos filinon.“



Kion la rano diris, tio okazis. La reĝino naskis knabinon, kiu estis tiel bela, ke la reĝo pro ĝojo apenaŭ povis trankviliĝi kaj aranĝis grandan feston. Li invitis ne nur siajn parencojn, amikojn kaj konatojn, sed ankaŭ la saĝulinojn, por ke ili favoru kaj ŝatu la infanon. Ekzistis dek tri en lia regno, sed ĉar li havis nur dek du orajn telerojn, el kiujn ili manĝu, unu el ili devis resti hejme. Oni festis la feston per granda pompo; kaj kiam ĝi finiĝis, la saĝulinoj pridonacis la infanon per siaj miraklaj donoj, unu el ili per virto, la alia per belo, la tria per riĉo, kaj tiel plu per ĉio, kio dezireblas en tiu ĉi mondo. Kiam dek unu el ili ĝuste diris sian diron, subite eniris la dektria. Ŝi volis venĝi sin pro tio, ke oni ne invitis ŝin. Kaj sen saluti aŭ nur rigardi iun, ŝi vokis per laŭta voĉo: „La reĝa filino piku sin en sia dekkvina jaro per ŝpinilo kaj falu morte planken.“
Kaj sen diri eĉ vorton plu, ŝi turniĝis kaj forlasis la halon. Ĉiu ektimis. Jen paŝis antaŭen la dekdua, kiu ankoraŭ ne diris sian diron. Kaj ĉar ŝi ne povis nuligi, sed nur mildigi la malican verdikton, ŝi diris: „Sed tio ne estu morto, sed centjara profunda dormo, en kiun la reĝofilino falos.
La reĝo, kiu volis konservi sian infanon kontraŭ la malfeliĉo, ordonis, ke ĉiuj ŝpiniloj de la tuta lando estu forbruligitaj. Por la knabino ĉiuj donoj de la saĝulinoj plenumiĝis tute, ĉar ŝi estis tiel bela, bonkonduta, afabla kaj komprenema, ke ĉiu, kiu rigardis ŝin, ne povis ne ŝati la infanon. Okazis, ke ĝuste je la tago, kiam ŝi fariĝis dekkvinjara, la gereĝoj ne estis hejme kaj la knabino postrestis tute sola en la kastelo. Jen ŝi vagadis en ĉiuj lokoj, rigardis laŭplaĉe ĉambrojn kaj kamerojn, kaj fine ŝi iris ankaŭ al malnova turo. Ŝi grimpis sur la malvasta helica ŝtuparo supren kaj atingis pordeton. En la seruro troviĝis rustita ŝlosilo, kaj kiam ŝi turnis ĝin, malfermsaltis la pordeto. Kaj en malgranda ĉambro sidis maljunulino kun ŝpinilo kaj ŝpinis fervore linon.
„Bonan tagon, maljunulinjo“, diris la reĝa filino: „Kion vi faras tie?“
„Mi ŝpinas“, diris la maljunulino kaj kapjesis per la kapo.
„Kio estas tiu aĵo, kiu tiel gaje saltadas?“ demandis la knabino, prenante la ŝpinilon, kaj ankaŭ volis ŝpini. Sed apenaŭ ŝi tuŝis la ŝpinilon, la sorĉodiro plenumiĝis kaj ŝi pikis sin en fingron.
Sed en tiu momento, kiam ŝi eksentis la pikadon, ŝi falis sur la liton, kiu staris tie kaj kuŝis en profunda dormo. Kaj tiu dormo disvastiĝis en la tuta kastelo. La reĝo kaj la reĝino, kiuj ĵus alvenis hejmen kaj paŝis en la halon, ekdormis, kaj la tuta korteganaro kun ili. Jen ankaŭ dormis la ĉevaloj en la stalo, la hundoj en la korto, la kolomboj sur la tegmento, la muŝoj sur la muroj. Ja la fajro, kiu flagris sur la kuirforno, kvietiĝis kaj endormis, kaj la rostaĵo ĉesis rosti, kaj la kuiristo, kiu volis tiri la kuirejan bubon je la hararo, ĉar li pretervidis ion, delasis de li, kaj ekdormis. La vento haltis kaj sur la arboj antaŭ la kastelo moviĝis eĉ ne plu folieto.
Ĉirkaŭ la kastelo komencis kreski dornoheĝo, kiu ĉiujare fariĝis pli alta, kaj fine ĉirkaŭvolvis la tutan kastelon kaj kiu kreskis eĉ pli alte ol ĝi, tiel, ke la kastelo tute ne videblis plu, eĉ ne la flago sur la tegmento. Sed disvastiĝis en la lando la onidiro pri la bela dormanta Dormulino, ĉar oni tiel nomis la reĝan filinon. Tial venis de tempo al tempo reĝofiloj. kiuj volis penetri tra la heĝo en la kastelon. Sed tio ne eblis al ili, ĉar la dornoj, kvazaŭ ili havus manojn, reciproke firmtenis sin. Kaj la junuloj firmkroĉiĝis je ili, ne povis liberigi sin kaj mortis mizere. Post tre tre multaj jaroj revenis denove reĝofilo en la landon kaj aŭdis kiel maljunulo parolis pri la dornoheĝo. Tiu diris, ke malantaŭ ĝi troviĝas kastelo, en kiu mirinde bela reĝino, nomata Dormulino, dormas jam dum cent jaroj, kaj kun ŝi la reĝo, la reĝino kaj la tuta korteganaro. Li ankaŭ sciis de sia avo, ke jam multaj reĝaj filoj iris

tien kaj provis penetri tra la dornoheĝo. Sed laŭ li ili firmkroĉiĝis je ĝi kaj trasuferis malĝojigan morton. Jen diris la junulo: „Mi ne timas, mi volas iri tien kaj rigardi la belan Dormulinon."

La bonkora maljunulo povis malkonsili al li kiom ajn, la reĝofilo ne atentis liajn vortojn.

Sed tiam ĝuste pasis la cent jaroj kaj estis veninta la tago, kiam Dormulino denove vekiĝos. Kiam la reĝa filo proksimiĝis al la dornoheĝo, ĝi jam ŝanĝiĝis en multegajn grandajn florojn, kiuj per si mem malfermiĝis kaj tralasis lin senvundita. Kaj malantaŭ li ili denove kunkreskis kiel heĝo. En la kortego li vidis la ĉevalojn kaj la makulkolorajn kuŝantajn ĉashundojn, kiuj dormis, kaj sur la tegmento sidis la kolomboj metintaj la kapon sub flugilon. Kaj kiam li iris en la domon, dormis tie la muŝoj sur la muroj. La kuiristo en la kuirejo ankoraŭ tenis la manon, kvazaŭ li volus kapti la bubon, kaj la servistino sidis antaŭ la nigra kokino, kiu estis senplumigota. Jen li iris plu kaj vidis en la halo la tutan korteganaron, kiu tie kuŝis kaj dormis. Kaj supre ĉe la trono kuŝis la reĝo kaj la reĝino. Jen li iris denove plu, kaj ĉio estis tiel kvieta, ke oni povus aŭdi sian spiradon. Kaj fine li atingis la turon kaj malfermis la pordeton al la ĉambreto, en kiu dormis Dormulino. Tie ŝi kuŝis kaj estis tiel bela, ke li ne povis deturni la okulojn, li kliniĝis kaj kisis ŝin. Kiam li tuŝis ŝin per la lipoj, Dormulino malfermis la okulojn, vekiĝis kaj rigardis lin tute afable. Jen ili iris kune malsupren. Kaj la reĝo vekiĝis kaj la reĝino. Kaj la tuta korteganaro rigardis sin reciproke per mirigitaj grandaj okuloj. Kaj la ĉevaloj en la korto ekstaris kaj skuiĝis. La ĉashundoj salte leviĝis kaj vostumis. La kolomboj sur la tegmento tiris la kapeton el sub la flugilo, ĉirkaŭrigardis kaj flugis al la kampoj. La muŝoj sur la muroj rampis plu; la fajro en la kuirejo vigliĝis, ekflagris kaj kuiris la manĝon. La rostaĵo denove komencis rosti. Kaj la kuiristo vangofrapis la kuirejan bubon tiel, ke li ekkriis; kaj la servistino senplumigis la kokinon ĝis la fino. Kaj jen oni festis la nupton de la reĝofilo kun Dormulino kun granda pompo. Kaj plezure ili vivadis ĝis sia fino.

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Dornröschen"

tradukis



Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

lingve kontrolis Vladimir Türk

Mila Ivancova

FONTEJO

(Buvette*)

Rapida, nerevenebla printempo. La urbestro havas multajn problemojn hodiaŭ – jen-jen venos la elektado! Unu el la planitaj eventoj estas la malfermo de pump-fontejoj en diversaj lokoj de la urbo, renkontiĝoj kun dankemaj urbanoj, eblaj balotontoj, kun ĵurnalistoj, intervjuoj por novaĵoj...

Ĉu vi ne scias, kion signifas la vorto "buvette-pumpfontejo"? Ho, tio ĉi estas via feliĉo. Aŭ malfeliĉo… Ĉi tiu vorto devenas de la franca "boire"* – trinki. En sanatorioj, ĉi tiuj estas fontoj kun minerala akvo, aranĝitaj por feriistoj. En grandaj modernaj urboj, ĉi tiuj estas pumpiloj de profunda akvo, instalitaj koste de la administraro, ekipitaj per estetika laŭbo kaj benkoj ĉirkaŭe, lumigitaj per lanternoj.

Beleco allogas homojn. Precipe, se oni ankoraŭ povas akiri puran neĥloritan kaj trinkeblan akvon. La fluanta el kranoj hejme ne plu taŭgas por trinki. Ni ne trinkas multe kaj ne kuiras je tiu ĉi akvo. Kial esti mallaborema? Vi povas promeni unu fojon dum du tagoj. Vi povas ankaŭ aŭti, rezervi ĝin por semajno.

La urbestro laŭte parolis mikrofone, kiel la urbo prizorgas siajn civitanojn, kiajn planojn la administrado havas por la proksima kaj fora estonteco. Dankemaj loĝantoj de la distrikto aŭskultis, metante malplenajn plastajn ujojn sur la kahelitan placeton, aplaŭdis.

La printempa suno bruligis somere, apude la granda strato estas kutime zumigita per aŭtoj. La urbestro tondris la ruĝan rubandon kaj li estis la unua alvenanto por preni akvon el la nova pumpilo.

Gardisto transdonis al li plastan akvujon.

Kristale klara akvo kirlis, trafis la kolon de la akvujo, kaj tiu, kiu ne sukcesis trafi enen, disiris ŝpruce per ĉielarko sur la kahelaron ĉirkaŭ la pumpilo. La urbestro malkovris propran akvujon, malligis la nodon

de sia kravato iom singlutis salivon.

– Nu, kial vi staras? Alvenu, plenigu, trinku por la sano! – Li diris al la homoj kaj gestis al la pompilo.



pentrita de Olego Loburak

La homoj rapide kaj kutime enviciĝis, vigle diskutante, kiel bonŝance ili ne plu devas veturi per publika transporto kun akvujoj, kiel antaŭe, al la malnova fontejo, de kie ili portis trinkakvon jam dum kelkaj jaroj. Diversaj vazoj estis plenigitaj per akvo, enmetitaj en sakojn ŝarĝitaj sur ĉarojn, homoj dankis la urbestron, interŝanĝis per impresoj pri la evento.

La urbestro adiaŭis kaj ekiris al la aŭto kun siaj kunuloj. Ĵurnalistoj faris la lastajn kadrojn por la fotokroniko. Subite la ĝeneralan bonvolan son-fonon rompis la freneza krio de la virino:

– Ne! Ne! Ne eblas! Sattrinku hejme!

Ĉiuj subite eksilentis, okule serĉante tiun, kiu okazis.

La juna virino, mallerte saltanta tra diversaj akvujoj, ekis al la benko, kie sidis la kvinjara knabo malŝtopiĝanta plastan botelon. La patrino ekprenis gasmaskon, kuŝanta sur liaj genuoj, kaj komencis tiri ĝin sur la vizaĝon de la knabo, sed la infano ekploris kaj kriis:

– Panjo, mi varmegas! Mi volas trinki!

La patrino eltiregis la botelon da akvo el liaj manoj, ĵetis ĝin sur la teron kaj denove provis tiri la gasmaskon sur la infanon. La knabo komence kriis, sed subite eksilentis, ekmoliĝis kaj ne rezistis. Ĉiuj ĉirkaŭe rigidiĝis.

La urbestro estis la unua rekoncsiiĝanta. Li laŭte flustris kaj ordonis al la gardisto:

– Voku la “Savo-Servo”-n! Eble, oni venos ĝustatempe.

Ankaŭ ĵurnalistoj rekoncsiiĝis, ekklakis fotiloj kaj kameraoj, avinoj ekĝemis, senpovantaj helpi:

– Malzorgema panjo... Oni devas tion elpensi – demeti la gasmaskon surstrate! Neniu permesis tiaĵon dum la longa tempo. Ja ŝi ne estas hejme aŭ interne kun klimatizilo! Bone, ke oni ne devas pagi por la instalado de purigiloj, la urbaj aŭtoritatoj provis denove, mi subtenas rekoncsiiĝanta.ĝin...

Proksime al la pumpilejo, la ambulanco haltis kaj teamo da kuracistoj elsaltis. Oni metis oksigenan maskon sur la palan vizaĝonm de la senmova kuŝanta sur benko knabo, la viktimo estis rapide ŝarĝita en aŭton, kaj lia patrino estis permesata akompani lin. La ambulanco eksirenis, ekis de la haltejo kaj trapasis rade la forlasitajn plastajn botelojn.

Ankaŭ ekmovis la aŭto de la urbestro. Estis multaj pliaj aferoj sur la tagordo. Streĉaj printempaj tagoj. “Terure malagrabla okazaĵo,” la urbestro pensis. “Ni devos preni la iniciaton ordigi esplorinstituton pensi pri hejma gasmasko, kiu ebligas al oni trinki sen forigi ĝin.” Ŝajnas, ke similaĵo jam servis al ĥemiaj arme-unioj. Bedaŭre, mi ne pensis pri tio antaŭe. Jen estas pluso en la elekta kampanjo!”

Varmegis. Oni volas trinki. La urbestro aŭtomate fiksis per la okulo, ke la aŭto-fenestroj estas hermetike sigelitaj kaj la klimatizilo funkcias. Li demetis sian gas-maskon, malstreĉis sian kravaton, malbutonigis sian blankan ĉemizon, englutis gluan salivon. En la mano ankoraŭ estis malvarma ŝvitinta akvujo. Li almetis ĝin al sia frunto. Sekurec-gardisto, sidanta apude, subite ekmovis akre.

– Ne zorgu, mi ne trinkos. Mi nur malvarmiĝos iomete. Mi estas laca, mi – elvaporiĝas... Eligu al mi el la fridujo mineralan akvon!

– Kion vi volas?

– Kiel kutime – ne karbonigitan de Svisaj Alpoj.

La dudekunua jarcento.

Kijivo, 2002

Elukrainigis



Araneo (Ukrainio)

*Buvette (de fr. boire — «drinki») — speciala konstruaĵo por eliro de la minerala akvo surfacen.

Mila Ivancova (1960) – ukraina verkistino, pedagogo, tradukistino. Verkas ankaŭ ruse, tradukas el la franca.



Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

